

PENSEO

N-ro 237

Jul. / 2011

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 22-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinio)



Serĉado

en nubaro mi serĉadas
 perditan kastelon.
 sabla ŝtormo viŝis ŝiajn spurojn.
 la aromo de la haroj
 estas la unika indikaĵo.
 palpante la impreson antaŭlongan,
 mi vagas inter steloj nigraj.
 tra tempozonoj
 la rozoj velkis en la dorsosako.
 ŝvito ne povas teni ilin freŝaj.
 spite, mi kuras, kuras
 kun piedoj senkonsciaj.
 neniuj kaj nenio.
 de la ĉielo al la tero,
 la falo trafas ŝtonon.
 el la ŝtono kreskas kakti.
 aŭskultante venton sekan,
 mia spirito aspiras larmojn.
 sur kiu planedo ŝi nun floras?
 mi soifas:
 la frukto venu de mia semo.

Tagoj sen sunlumo

mi kredas
 ke la suno ja ekzistas
 eĉ en la nokto,
 sed dum tagoj
 sunlumon mi ne vidas.
 ŝia foriro mian ĉielon
 nubizas diurne.

iam
 mi
 ekvolas sunumi
 la ŝiman koron en alies korto,
 tamen ĉe la pordo
 mi deprenas mian fingron
 kvankam jam malmolan.
 ŝia ombro
 restas kurteno,
 kiu kovras mian rigardadon.
 la piedoj estas ĉiam
 gluitaj en ŝia turn-akvo.
 sen lumo
 mi aŭskultas nigron atendigan.
 ventoj.
 folioj flugas en la ĉelon.
 tiuj estas duonlunoj
 kiujn ŝi sendas trans la suno.



Eĉino (Ĉinio)

Li Na venkis

Li Na venkis en granda ŝlemo,
 kreis rekordon por Ĉinio,
 kaj ankaŭ gloron por Azio:
 Tenisa stel' sub diademio.

Sed oni pri "landa sistemo"
 diskutas: ĉu aŭtokratio?

Li Na venkis en granda ŝlemo,
kreis rekordon por Ĉinio.

Samideanoj, pri la temo
meditu kun pens-asocio.
Kiom similas la medio
nia kaj solvo de problemo:

Li Na venkis en granda ŝlemo!
2011-06-04



Erzsébet Tuboly (Hungarujo)



Majaj Hajkoj 2011

Mirinda majo.
Siringodoro dolĉe
Min karesadas.

Mirinda majo.
Robiniarbo-floroj
Mielon elspiras.

Mirinda majo.
Varmetaj noktoj ravaj
Amorvekantaj.

Varmeta nokto
Odoras siringoflor'
Vekiĝas amor'

Sopiroplena
Dolĉodora majonokt'.
Revas junulin'.

Sopiroplena

Maja nokto. Junulin'
Revas pri amor'.

Dolĉe ondumas
Mielodoro. Amor'
Ŝvebas tra aer'.



Rafael Bolivar Coronad

(kantteksto)

Animo savana

Mi naskiĝis ĉe vibrado
de Araŭka riverflu',
do mi fratas al la ŝaŭmo
al la rozoj, al ardeoj,
jes mi fratas al la ŝaŭmo
al la rozoj, al ardeoj
kaj al sun', kaj al sun'.

Lulis min la tamburado
de la brizo ĉe l' palmar'
do anime mi similas
al animo delikata
jes anime mi similas
al animo delikata
de kristal', de kristal'.

Ame, plore, kante, reve,
elverŝiĝas mia kor'
elverŝiĝas mia kor'.
Ame, plore, ride, reve,
mi ornamas la ruanan
ĉevalon de la sinjor'.

Mi naskiĝis ĉe vibrado

de Araŭka riverflu',
do mi fratas al la ŝaŭmo
al la rozoj, al ardeoj,
jes mi fratas al la ŝaŭmo
al la rozoj, al ardeoj
kaj al sun', kaj al sun'.

Lulis min la tamburado
de la brizo ĉe l' palmar'
do anime mi similas
al animo delikata
jes anime mi similas
al animo delikata
de kristal', de kristal'.

Ame, plore, kante, reve,
elverŝiĝas mia kor'
elverŝiĝas mia kor'.
Ame, plore, ride, reve,
mi ornamas la ruanan
ĉevalon de la sinjor'.

Mi naskiĝis ĉe vibrado
de Araŭka riverflu',
do mi fratas al la ŝaŭmo
al la rozoj, al ardeoj
kaj al sun'.

Tradukis:



Svena Dun (Hispanio)



Fernando Pessoa (1888-1935)



Aŭtopsikografio

Alte simulas poet',
per lia simullaboro
dolor' eĉ iĝas portret'
de lia sent' de doloro.
Kaj por kiuj lin finlegas
jam la legata dolor'
ne el liaj du senregas
sed laŭ sent' de novaŭtor'.
Jen laŭ gir' de reloj tire
racion kun tiklo for
trajneto korda, memstire,
kaj kies nom' estas kor'.

Noto de tradukinto: "Traduttore, traditore" estas konata itala proverbo (Tradukistoj, perfiduloj) kiu, efektive, ne malofte staras antaŭ tiu kiu prenas sur sin la tasko traduki iun ajn tekston, ĉu teknikan, ĉu literaturan (prozan aŭ versan).

Traduki ĉi poemon estis samtempa granda defio kaj alta ĝuo ĉar miaj provoj kaj reprovoj (pli ol 20 versiojn mi skribis) ĝis atingi ĉi-tiun preskaŭ plene kontentigan formon finkonstituis veran alkemion por mi mem, kiu devis konsciiĝi ke mi ne povus, - ne devus! nur kaj simple produkti tekston kun ritmo kaj rimo, kaj kun pli malpli sufiĉe bona redono de la enhavo originala. Tute ne!

Vere, sekva traduko estas frukto de analizo kaj enprofundiĝo al ĉiu nuanco el preskaŭ ĉiu

vorto kaj frazkonstruo ene de ĉiu verso, kaj de ĉiu strofo. Poste, analizo de la penso interliganta ĉiun strofon, la stilo (la poemo estas vera rakontado, fakte, estas kvazaŭ dialogo inter poeto kaj leganto) sen paroli la sublinian egfajnan ironion laŭlonge de la poemo pri homa senkapablo plene difini realon, kun krona finalo, ke, en arto, emocio ne nur iras en defia paralelo kun racio, sed ankaŭ ĝin superas, aŭ eĉ superu. Tiaj estas instigaj eroj ene de nura tri-strofa soneto. Certe, multo pli estas malkovriĝota, kiel la priparolata okultisma faceto de la aŭtoro [kion li esprimas pere de numerologio (konstatebla ĉe la nombro, aŭ ripeto, de certaj vortoj en la poemo)] kaj aludo al alkemio, rekte videbla kaj en la titolo, kaj en la formo de la poemo en si (per ties dialoga memprezento, kaj versenkadeniĝo, kio, vole-nevole, fariĝas forta pripensigilo) Kaj, entute, la poemo staras kiel egklara esprimo de la koncepto de la aŭtoro mem pri arto!

Tradukis



Ŭel (Brazilo)



Paŭlo Sena (Brazilo)



DORMEMA FORTO

Ĉe vulkanbuŝo kuŝas unu sola ombro,
Kies dorm' daŭras longe kaj sen fino.
Ĝia vivspir' antaŭas al l' unua homo,
Ĉar di' ĝin naskis fore de la ŝlimo.

Raŭka ronk' ŝajnas semi dubon en la koro:

Estas la pensfluo de tiu, kiu dormas.

Eĉ en dorm' tenas ĉion sub sia kontrolo

Kaj pere de menso ĝi sin mem aliformas.

LA NEDIREBLA VORTO

Ununura vorto inter du linioj

Desegnita de kaduka filozofa

Laŭ tiamaj tro malhelaj kriterioj,

Je falema bru' de viva katastrofo.

Ĝi, la finon, kaŭzis al la imperioj

Ĉar ĝin oni legis post hazarda trovo.

Nedireblaj fariĝu eĉ la mencioj:

Iu ajn buŝo restu antaŭ ĝi sen movo!

Ĉineske

Stafeto laŭ Fengrusong

Fengrusong (vento inter pinoj): ĉina fiksoforma poemo el du strofoj kun 7 kaj 6 versoj respektive de 7,5,734,66 / 7,5,77,66 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xxa,xa /a,a,xa,xa (x=senrima)

Eto (Ĉinio)

Maja nokto

junaj herboj en kviet'

sen homa surtret'

sterniĝas ĝis malproksim'

senbrue

per brilojet'

lampiroj jen flugas

flagre super vojstret'

dolĉa anima duet'

kun korpa almet'

ludas en kor-koncerto

fole per tona impet'
 koroj reciprokas
 mesaĝojn en sekret'

Cindy Mckee (Usono)



Jarjuna majo

Majo estas profeto,
 juna poeto
 kiu verkas blankverse
 divenojn.
 Nur kupleto,
 majece plena je
 jara malkompleto.

Majo estas tapeto
 sorĉa sub treto
 kiu flugas nefore.
 Nur pinta pirueto.
 Pasaĝeroj alas
 junia impeto.

al + as-verbigo = alas



Viktoro (Ĉinio)

Maja allogo

knabinoj kiel magnet'
 kun ĉarma koket'
 ornamas sin allogo
 per bela
 la tualet'
 jam sin ekipas per
 seksalloga komplet'

 pufaj mamoj per obsed'

de sorĉa ripet'
 altiras vidojn virajn
 celajn je ina sekret'
 jam ne plu povantajn
 sin teni en kviet'



Eto (Ĉinio)

Ama dueto

—laŭ ĉineska skemo Changxiangsi*

koketo
 kiseto
 jam kora malkvieto
 korpa kunmeto

dueto
 en preto
 por amora impeto
 ne amuleto

Triopo de Huanxisha

Huanxisha (Silk-lava roĵo): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po tri versoj de sep silaboj laŭ rimaranĝo aaa / xaa (x=senrima)

Su Shi (1037-1101)

Fein' tenera

Tra vesto ŝvit' leĝera.
 Morgaŭ baniĝ' libera.
 Ŝvebas arom' rivera.

Bunta fadeno volvas
 jadbrakon esotera.

Ravas fein' tenera.

elĉinigis




Guozhu (Ĉinio)

Cindy Mckee (Usono)

Zongzi al mia plum-feo

Sukplenan sanan rizon,
laŭfluan helpan brizon,
ĝardenan paradizon/

Bonojn al dista feo!
Skribe vi ŝanĝas grizon
en ĝoj-buntan surprizon



Guozhu (Ĉinio)

Al Cindy

(2011-06-07)

al Cindy dankon benan,
zonzi-on specimenan,
sanan rizon sukplenan,

Bonojn al plum-feino!
ĉineskon kor-komprenan,
paradizon ĝardenan!



Vejdo (Ĉinio)



Al Serena (Yoyo)

okaze de ŝia naskiĝtago 2011

—laŭ ĉineska skemo Sopir-al-sudo*

Saluton,
kara Serena!
Vi vivas en sudlando
kun vetero lumplena
kaj suno bona.

Kial ne
vivi kun fervor',
senĝene ĉiutage
jen kiel sudlanda flor'
sen ajna dolor'?

Ha, kara,
ne malproksima
via brila sukceso,
se vi estas sentima
el kot' deprima.

Ankoraŭ
budaa favor'
vin gardas kaj protektas
en viaj viv' kaj labor'
je ĉiu temp-hor'.

Mi el for'
deziras al vi
ĝojon kaj kor-serenon,
kaj memfidon kun pasi'
en bona medi'.

2011-06-13

**Yijiangnan (Sopir-al-sudo): ĉina fikforma
poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ
rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*



Memfida leporo

okaze de la naskiĝtago de Anniespera (2011)

—laŭ ĉineska skemo Busuanzi*

Post vetkurado
testud-lepora,
ŝi ja korŝire pentis
per plendo plora.

Ŝi do komencis
per ag' fervora
fosadi sian sulkon
en pen' labora.

Ŝi kalkulas pri
fosa progreso
jen kun trankvila koro
kun intereso.

En sia nesto
pensas sen ĉeso
ŝi, kiel diligentas
ŝi por sukceso.

De sekva tago
kun klara celo
ŝi ekzercas sin kuri
en suna helo.

Ŝi volas montri
per arta belo
superecon en onta
kura duelo.

Ĉio dependas
de asiduo,
nek de fanfaronado
nek de kri-bruo.

Plej bone ridas
en tempa fluo
kiu ridas ja laste
kun dolĉa ĝuo.

*Busuanzi (aŭguristo): ĉina fiksfirma poemo
el du strofoj kun po kvar versoj de 55,75
silaboj kun duona rimo.



Lily (Ĉinio)

Malsukcesa amor'

—laŭ ĉineska skemo Yulinling*

Jam pasis for
la rendevu'.
En mia kor'
ankoraŭ impulsas
mia pasi'.
Dum tiu hor'
reciprokis kisoj
varmaj sen pudor'
en brakum'
kaj lang-mordad'
instigis nin al amor'.

Li ĝin elprenis por bor'
tamen ĝi
tuje kun langvor'
falas kaj ekmolis
kolapsis.
Blanka likvor'
lante fluis
vane.
Ho ve, kia sinjor'!
Kial vi
impotentis
antaŭ la klitor'?



*Yulinling (*Tintado en pluvo*): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj respektive de 4,44,644,65,347 / 7,35, 634, 426,345 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa, xxa, xa, xxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x = senrima)

Sero (Ĉinio)

Vizio en sonĝo

—laŭ ĉineska skemo Moyuer*

en sonĝo
mi hazade
renkontiĝas kun ŝi
bela kaj delikata
blanka kiel lili'
de juli'
ŝi ridas
arĝent-tintile al mi
kun fantazi'
mi dronas blinde
pro ŝia ĉarm'
en ĝoja ebri'

mi ne plu
eltenas kun pasi'
kaj juna energi'
al ŝi mi min aljetas
sen ioma konsci'
pro magi'
alloga
mi ŝin kisas kun mani'
kaj emoci'
mi peze falas
el la lito
ha, sonĝ-iluzi'



*Moyuer (*fiŝado*): ĉina fiksforma poemo el du

strofoj kun po 12 versoj de 346, 76, 3, 37, 4, 545 / 36, 6, 76, 3, 37, 4, 545 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa,xa,a,xa,a,xxa / xa, a,xa, a,xa, a,xxa (x=snrima)

Guozhu (Ĉinio)

Wuhan Post Pluvo en Paneo

Vespera,/ sufera/, strato iĝis rivera.
Pluveg' tre/ ĝenas ke/ aŭtobusa/ ĉie
pane'/ Ve,ve,ve!
Mizera,/ kolera,/ popol' post pluv'severa
plendas tre/ urĝas ke/ dren-sistemo/ ĉu al
pere'?!/ Ne, ne, ne!

Noto:

2011-06-18 dum enurba veturo renkontis pluvegon. Inundo sur stratoj. Aŭtobusoj paneas. Trafiko ŝtopiĝas. Urbanoj post 5-6 horoj da veturo ankoraŭ ne povas reveni hejmen, sentas urĝon en veturilo sen necesejo. Multaj plendoj tra la varma linio al urboestro. Dum la senhelpa atendado mi versis ĉineskon Chaitoufen.

Maupassant (1850-1893)



MIA ONKLO SOSTEN'

Al Paul Ginisty

Mia onklo Sosten' estis liberpensulo, kiel multe da ili, li estis liberpensulo pro stulteco. Ofte oni estas religia laŭ la sama maniero. La vido de pastro enfaligis lin en nekoncepteblan furiozecon; li pugnominacis lin, faris kornsignon al li, kaj tuŝis feron malantaŭ sia dorso, tio kiu jam elmontris kredon, la kredon al la sorĉa rigardo. Nu, kiam temas pri senpensaj kredoj, necesas kredi al ĉiuj aŭ kredi al nenia. Persone, mi ankaŭ estas liberpensulo, tio estas ribelulo kontraŭ ĉiuj

dogmoj, kiujn la mortotimo inventigis, sed mi ne koleras kontraŭ la temploj, ke tiuj ĉi estas katolikaj, apostolaj, romanaj, protestaj, rusaj, grekaj, budhismaj, judaj, muzulmanaj. Kaj poste, mi havas personan manieron konsideri kaj ekspliki ilin. Templo estas omaĝo al la nekonataĵo. Ju pli la penso plivastiĝas, ju pli la nekonataĵo malpliĝas, des pli la temploj disfalas. Sed, anstataŭ enmeti incensilojn enen, tien mi lokus teleskopojn, mikroskopojn kaj elektrajn maŝinoj; Jen !

Mia onklo kaj mi, ni malakordis pri preskaŭ ĉiuj temoj. Li estis patrioto, tio mi ne estas, ĉar la patriotismo ankaŭ estas religio. Ĝi estas la ovo de la militoj.

Mia onklo estis framasono. Mi deklaras, ke la framasonoj estas pli stultaj ol la maljunaj devotulinoj. Tio estas mia opinio, kaj mi subtenas ĝin. Kaj eĉ se necesus havi religion, la malnova sufiĉus al mi.

Tiuj naiveguloj faras nur imiti la parokestrojn. Kiel simbolo, ili havas triangulon anstataŭ krucon. Ili havas kirkojn, kiujn ili nomas Loĝioj, kaj amason de diversaj kultoj: la Skota rito, la Franca rito, la Granda-Oriento, serion da malseriozaĵoj kiuj estas riposplite ridindaj.

Poste, kion ili volas ? Sin helpi reciproke, tiklante unu la alian la manpolmon ! Tie mi ne vidas malbonan agadon. Ili aplikas la kristanan precepton: «Interhelpu unuj la aliajn». La nura diferenco konsistas en la tiklado. Sed, ĉu estas utile fari tiom da ceremonioj, por prunti cent soldojn al mizerulo ? La religiuloj, por kiuj la almozo kaj la helpo estas devo kaj metio, strekas ĉe la kapo de siaj epistoloj tri literojn : J.M.J.. La framasonoj metas tri punktojn ĉe la fino de sia nomo. Dorson ĉe dorso, komplicoj!

Mia onklo respondis al mi: «Trafe, ni starigas religion kontraŭ religion. Ni faras per la liberpensado armilon, kiu mortigos la klerikalismon. La framasonismo estas la

citadelo, en kiu ĉiuj diaĵaj malkonstruistoj estas varbitaj. »

Mi rebatis: «Sed mia bona onklo (interne, mi diris : «maljuna mitulo»), estas ĝuste tio, kiun mi riproĉas al vi. Anstataŭ detrui, vi organizas la konkurencon: tio malaltigas la prezojn, jen la tuto. Kaj poste, se vi akceptus inter vi nur la liberpensulojn, mi komprenus; sed vi akceptas ĉiujn. Ĉe vi, estas multaj da katolikoj, eĉ ĉefoj de la partio. Pio la 9a estis ĉe vi, antaŭ fariĝi papo. Se vi nomas tian Societon: citadelo kontraŭ la klerikalismo, mi trovas vian citadelon ja malforta. »

Tiam, mia onklo, palpebrumante, aldiris : «Nia vera agado, nia agado la plej grandega koncernas la politikon. Ni sapeas, per konstanta kaj certa maniero, la monarkan spiriton.»

Ĉifoje, mi eksplodis: «Ha! jes, vi estas petoluloj! Se vi dirus al mi, ke la framasonismo estus balotuzino, mi konsentus pri tio; ke ĝi utilis kiel maŝino por voĉdonigi al la kandidatoj de ĉiuj tendencoj, neniam mi neus tion; ke ĝi ne havus alian rolon ol mistifiki la bonan popolon, enregimentu ĝin, por ke li iru al la balotilujo, kiel oni sendas la soldatojn al la pafado, mi samopinius kiel vi; ke ĝi utilis, eĉ nepre necesus al ĉiuj politikaj ambicioj, ĉar ĝi ŝanĝas kiel elekta agento ĉiun de siaj anoj, mi krius al vi: «Tio estas klara kiel la suno!» Sed kiam vi pretendas al mi, ke ĝi utilis por sapei la monarkan spiriton, kia sensecaĵo!»

«Konsideru iom tiun vastan kaj misteran demokratian asocion, kiu havis en Francio sub la Imperio, la princon Napoleono kiel granda majstro; en Germanio la heredantan princon, kiel granda majstro; en Rusio la fraton de la caro; kaj kies partoprenas la reĝo Umberto kaj la princo de Kimrio, kaj ĉiuj kronitaj kapoj de la globo!»

Ĉifoje mia onklo subdiris al mi en la oreilon: «Tio estas vera, sed ĉiuj tiuj princoj, nenion suspektante, servas niajn projektojn. »

– Kaj reciproke, ĉu ne ?

Kaj aparte mi aldiris: «Naivegularo!» Kaj endis vidi mian onklon Sosten', kiam li regalis per vespermanĝo framasonon.

Unue ili renkontiĝis kaj sin tuŝis reciproke la manojn kun mistera mieno entute ridinda, oni vidis ke ili sin fordonis al serio da sekretaj manpremoj. Kiam mi volis kolerigi mian onklon, sufiĉis al mi memorigi al li, ke ankaŭ la hundoj havas manieron, tute framasonan, sin rekoni reciproke.

Poste mia onklo forkondukis sian amikon en la angulojn, kiel por konfidi al li konsiderindajn aferojn; poste, vidalvide ĉe la tablo, la maniero laŭ kiu ili sin rigardis reciproke, krucis siajn rigardojn, palpebrumante kiam ili trinkis, kiel por senĉese ripeti al si: «Ni estas anoj, nu!»

Kiam mi pensas, ke ili estas tiel milionoj sur la tero, kiuj amuziĝas per tiuj afektadoj! Mi ankoraŭ preferus esti jezuito.

Nu, en nia urbo estis maljuna jezuito, kiu estis la turmentato de mia onklo Sosten'. Ĉiufoje kiam li renkontiĝis kun tiu ĉi, aŭ nur kiam li ekvidis lin de malproksime, li murmuris : « Fripono, hej! » Poste, li ekprenis al mi la brakon, kaj flustris al mi ĉe la orelo: « Vi vidis, ke tiu kanajlo suferigos min, iun tagon aŭ la alian. Tion mi sentas. »

Mia onklo pravis. Kaj jen kiamaniere la akcidento okazis pro mia kulpo.

La sankta semajno alproksimiĝis. Tiam mia onklo havis la ideon aranĝi, la vendredon, vespermanĝon kun viando, sed veran vespermanĝon, kun tripokolbaso kaj cervelaso. Mi malcedis tiom longe mi povis; mi diris: « Tiun tagon, mi manĝos viandon, sed kiel ĉiam, tute sola, hejme. Tio estas idiota, via manifestado. Kial manifesti ? Pri kio, tio ĝenas vin, ke geuloj ne manĝas viandon? »

Sed mia onklo ne cedis. Li invitis tri amikojn en la plej grava restoracio de la urbo; kaj ĉar estis li kiu pagis, mi ankaŭ ne malakceptis manifesti.

Ekde la kvara vespere, ni estis bone videblaj en la gastejo Penelopo, la plej bone vizitata de la urbo; kaj mia onklo Sosten', laŭtege rakontis sian menuon.

Je la sesa oni altabliĝis. Je la deka oni ankoraŭ manĝis, kaj oni jam trinkis, kvinope, dek ok botelojn da fajna vino, kaj kvar da ĉampano. Tiam mia onklo proponis tion, kiun li nomis la «trinkregalo de la ĉefepiskopo.» Oni lokis linie, antaŭ si, ses glasetojn, kiujn oni plenigis per diversaj likvoroj; poste endis engluti ilin, sinsekve, dum unu el la ĉeestantoj nombris ĝis dudek. Tio estis stulta; sed mia onklo Sosten' trovis ke tio «esti taŭga cirkonstanco.»

Je la dek-unua, li estis komplete ebria. Necesis ke oni kunportu lin per veturilo, kaj enlitigu lin, kaj jam oni povis konjekti, ke lia kontraŭklerikala manifestado tuj transformos en teruran misdigeston.

Dum mi revenis al mia loĝejo, ebria mi mem, sed per gaja ebrieco, makiavela ideo, kaj kiu kontentigis ĉiujn miajn skeptikismajn instinktojn, ĝermis en mia kapo.

Mian kravaton mi rearanĝis, malesperan mienon mi faris, kaj mi iris sonorigi, kiel furiozulo, ĉe la pordo de la maljuna jezuito. Li estis surda: li atendigis min. Sed ĉar mi ŝancelis la tutan domon per miaj piedbatoj, fine, kapvestita per sia kotonkufo, li aperis ĉe sia fenestro, kaj demandis: «Kion oni volas al mi?»

Mi kriis: «Rapidu, rapidu, mia pastra moŝto, malfermu al mi; temas pri malespera malsanulo, kiu postulas vian sanktan peradon!»

Tuj, la kompatindulo surmetis pantalonon kaj, nevestita per sia sutano, malsupreniris. Per anhelanta voĉo, mi rakontis al li, ke mia onklo, la liberpensulo, estis subite ekkaptita de terura malsaneto, kiu konjektis tre gravan malsanon, ke li ektimegis la morton, kaj deziris vidi lin, interparoli kun li, aŭskulti liajn konsilojn, pli bone koni la kredojn,

alproksimiĝi de la Eklezio, kaj sendube konfesdoni, poste komuniĝi, por pace kun li mem, transpasi la timindan kaj lastegan provon.

Kaj, per ribelema tono mi aldiris: «Fine, li deziras tion, se tio ne profitus al li, tio ankaŭ ne malprofitus al li.»

La maljuna jezuito, konsternegata, kontentega, tremantege diris al mi: «Atendu min dum momenteto, mia infano, mi tuj venos.» Sed mi aldiris: «Pardonu, mia pastra moŝto, mi ne akompanos vin, miaj konvinkoj tute ne permesas tion al mi. Mi eĉ malakceptis, ke mi venu tien por serĉi vin; ankaŭ mi petus al vi ne konfesi al li, ke vi vidis min, sed diri, ke ia speco da revelacio antaŭavertis vin, pri la malsano de mia onklo.»

La bonulo konsentis pri tio, kaj rapidpaŝe foriris, poste li sonorigis ĉe la pordo de mia onklo Sosten'. La servistino, kiu flegis la malsanulon, baldaŭ malfermis, kaj mi vidis la nigran sutanon malaperi en tiun fortreson de la liberpensado.

Mi min kaŝis sub najbaran pordon por atendi la eventon. Se mia onklo estus bonfarta, li svenbatus la jezuiton, sed mi sciis, ke li estis nekapabla movi eĉ brakon, kaj mi demandis al mi, kun delira ĝojo, kian neverŝajnan scenon okazos inter tiuj du kontraŭuloj? Kian luktadon? Kian eksplikon? Kian konsterniĝon? Kian konfuzegaĵon? kaj kian elnodiĝon al tiu senelira situacio, kiun la indigno de mia onklo ankoraŭ pli tragikigos!

Tute sola, mi preskaŭ tenis al mi la flankojn pro ridego; mi duonvoĉe ripetis al mi: «Ha! kia bona ŝerco, kia bona ŝerco!»

Tamen estis malvarme, kaj mi rimarkis ke la jezuito ja longtempe restis. Mi diris al mi: «Ili sin kverelas reciproke.»

Unu horo pasis, poste du, poste tri. La pastra moŝto tute ne eliris. Kio okazis? Ĉu vidante lin, mia onklo estis mortinta pro konsterniĝo? Aŭ ĉu li mortigis la viron al la sutano? Ĉu ili reciproke intermanĝis sin? Tiu

lasta supozo ŝajnis al mi malmulte probabla, ĉar mia onklo en tiu momento estis ja nekapabla engluti unu plian gramon da nutraĵo. Tagiĝis.

Maltrankvila, kaj ne aŭdacante miavice eniri ĉe mia onklo, mi memoris ke unu el miaj amikoj ekzakte loĝis aliflanke. Mi iris ĉe tiu ĉi; diris al li la aferon, kiu mirigis kaj ridigis lin, kaj mi embuskiĝis ĉe lia fenestro.

Je la naŭa matene, mi cedis mian lokon al li, kaj mi iom dormis. Je la dua posttagmeze, miavice mi anstataŭis lin. Ambaŭ estis tre konsternataj.

Je la sesa vespere la jezuito eliris kun pacema kaj kontenta mieno, kaj ni vidis lin kvietpaŝe malproksimiĝi.

Tiam honta kaj timida, miavice mi sonorigis ĉe la pordo de mia onklo. La servistino aperis. Mi ne kuraĝis pridemandi al ŝi, kaj nenion dirante mi supreniris.

Mia onklo Sosten', pala, lacega, elĉerpata, kun la okuloj malĝojaj, la brakoj inertaj, kuŝis en sia lito. Malgranda pia bildo estis alpinkita ĉe la kurteno per pinglo.

Oni forte flaris la misdigeston en la dormoĉambro.

Mi diris: «Nu, mia onklo, vi estas ankoraŭ kuŝanta! Ĉu do vi malbonfartas?»

Li respondis al mi per lacega voĉo: «Ho! mia kompatinda infano, mi estis ja malsana, mi preskaŭ mortis.»

– Kiel do, mia onklo ?

– Mi ne scias; tio estas ja mirinda. Sed tio, kiu estas la pli stranga, estas ke la jezuita pastro, kiu ĵus eliris de tie, vi scias, tiu bravulo kiun mi abomenis, nu, li havis riveladon pri mia sanstato, kaj li venis vidi min.

Tiam, granda bezono de ridado ekkaptis min. «Ha! ĉu vere ?»

– Jes, li venis. Li aŭdis voĉon, kiu diris al li, ke li ellitiĝu, kaj li venu tien ĉi ĉar mi tuj mortos. Tio estas Revelacio.

Mi ŝajnigis terni por ne ekridi. Mi emis disruli surteren.

Post unu minuto, malgraŭ subitaj kaj mallongaj ekridoj, mi sukcesis reparoli per malinda tono: «Kaj vi, mia onklo, vi akceptis lin? vi unu liberpensulo? vi unu framasano? Vi ne ĵetis lin eksteren, ĉu?» Li aspektis konfuza, kaj balbutis: «Aŭskultu do, tio estis tiom mirinda, kaj tiom providenca! Kaj poste li parolis al mi pri mia patro. Antaŭe li konis mian patron.

– Vian patron, mia onklo, ĉu?

– Jes, aperas ke li konis mian patron.

– Sed tio ne estas motivo por akcepti jezuiton.

– Tion mi ja scias, sed mi estis malsana, tiom malsana! Kaj li flegis min kun granda sindonemo dum la tuta nokto. Li estis perfekta. Li savis min. Ili estas iom kuracistoj, tiuj uloj.

– Ha! Li flegis vin dum la tuta nokto. Sed vi ĵus diris al mi, ke li ĵus nur eliris de tie ĉi, ĉu?

– Jes, estas vere. Sed, pro tio ke li estis bonega kun mi, mi konservis lin por la tagmanĝo. Li manĝis ĉi tie, apud mia lito, sur malgranda tablo, dum mi trinkis teotason.

– Kaj... li viandon manĝis, ĉu?»

Mia onklo faris movon de ofendiĝantulo, kvazaŭ mi ĵus dirus egan maldecaĵon, kaj li aldiris: «Ne malserioze parolu, Gastono, estas moko kiuj estas malkonvenaj. Tiu homo, en tiu okazo, estis pli sindonema ol neniu parenco; mi volas ke oni respektu liajn konvinkojn.»

Ĉifoje, mi estis konsternata; tamen mi respondis: «Bonege, mia onklo. Kaj post la tagmanĝo, kion vi faris ?

– Ni kartludis partion de brisko, poste li diris sian brevieron, dum mi legis malgrandan libron, kiun li kunportis kun li, kaj kiu tute ne estas malbone skribita.

– Ĉu pia libro, mia onklo?

– Jes kaj ne, aŭ prefere ne, temas pri la historio de iliaj misioj en centra Afriko. Ĝi estas pli volonte libro pri vojaĝo kaj aventuroj. Kion tiuj viroj faris tie for, estas tre bela.»

Mi komencis trovi, ke la afero ne iris glate. Mi stariĝis: «Hej, adiaŭ, mia onklo, mi vidas ke vi forlasis la framasonaron por adopti la religion. Vi estas renegato. »

Li estis ankoraŭ iom konfuza, kaj murmuris: «Sed la religio estas iu speco de framasonismo.»


Mi demandis: «Kiam li revenos, via jezuito?» Mia onklo balbutis: «Mi... mi ne scias, eble morgaŭ... tio ne estas certa. »

Kaj mi eliris, komplete mirkonsternata.

Mia ŝerco tute ne iris glate! Mia onklo estas ĝisfunde konvertita. Ĝis antaŭ nelonge, tio tute egaligis al mi. Klerikalulo aŭ framasono, laŭ mi tio estas kufo blanka kaj blanka kufo, sed la pli malbone estas, ke li ĵus testamentis, jes testamentis, kaj li senheredigis min, sinjoro, favore al la pastra jezuita moŝto.

La 12an de aŭgusto 1882

elfrancigiss



Noël Lecomte
(Francujo)



Eldonas Redakcio de *Penseo*
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo
de No. 19, Wujiang St., Jiangbei Distrikto,
Chongqing, 400020, Ĉinio
Tel: (023) 67095890 (hejme)
Retadreso: vejdo@163.com

Ĉiujn kontribuojn al la ĉefredaktoro.

Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin turnu al www.elperno.cn/penlisto.htm aŭ

<http://gazetejo.org/eo/penseo>

